



A quarterly organ of the Esperanto Association of Britain

Kvaronjara organo de Esperanto-Asocio de Britio

No. 51, October–December 2010 ★ N-ro 51, oktobro–decembro 2010

ISSN 1741-4679

**International communication without discrimination ★ Respect for all cultures**  
**Internacia komunikado sen diskriminacio ★ Respekto por ĉiuj kulturoj**



## **50 years of residential Esperanto courses in Barlaston**

**I**t is believed that the residential courses that have been organised at Wedgwood Memorial College in Barlaston, Staffordshire, for the last half-century are probably the longest-running continuous Esperanto courses in the world – unless, of course, you know otherwise.

### **Day of celebration**

On 11 August, there was a day of celebration during the annual Esperanto Summer Festival week at the college. >>

*Top: Dr Marjorie Boulton giving her talk on the founding and first 25 years of courses at Wedgwood Memorial College in Barlaston.*

*Above: Questions and reminiscences from the audience.*

*Right: Dr Paul Gubbins addresses the celebrators at the reception.*



The day of celebration started with a sherry reception, at which Dr Paul Gubbins presented a short history of the courses, thanking those who had started them and those who had kept them running so smoothly through five decades. EAB President, Prof. John Wells, sent apologies for not being able to attend.

Unfortunately, several of those who have played significant roles in the courses have passed away, not least of whom was Alderman Horace Barks of Stoke-on-Trent, who originally set up the courses so many years ago, together with Dr Marjorie Boulton.

The 37 participants then left for an excellent celebratory luncheon, provided in the college dining-room.

After lunch, Marjorie Boulton gave a talk on the genesis of the courses and her reminiscences from their first 25 years. (The full text will appear in an issue of *La Brita Esperantisto*.)

Despite the future of the college still being uncertain, it was most gratifying that this year's *Somera Festivalo* had filled the college for the week, with hardly a spare bed available.

Congratulations all round – for an excellent day – and for 50 years of productive work. □



Above: Part of The Top Table – from the left – Viv O'Dunne, Derek Tatton, Hilda Jones, Paul Gubbins, Marjorie Boulton and David Kelso. Right: The exhibition at the college on the history of the courses. Below: The full dining-room



- Material for the next issue of *EAB Update* should be with the editor no later than 26 November.
- Materialo por la venonta numero de *EAB-Ĝisdate* atingu la redaktoron plej laste la 26an de novembro.

*EAB-Update* / *Ĝisdate* is a quarterly organ of the **Esperanto Association of Britain** / estas kvaronjara organo de **Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House / Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.**

• Tel. 0845 230 1887 / +44 (0)1782 372141

• Fax / fakse: on request / laŭpete

• E-mail / rete: eab@esperanto-gb.org

• Websites / ttt-paĝaroj: www.esperanto-gb.org  
www.esperantoeducation.com

□ Membership of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter or youth member £10 / Membrigi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto aŭ juna membro pagas £10 pundojn.

☆

□ Material for *EAB Update* should be sent by e-mail, computer disk (rtf format, please) or hard copy direct to the editor / Materialon por *EAB-Ĝisdate* oni sendu rete (formaton rtf, mi petas), diske aŭ papere rekte al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich NR11 6JW; e-mail / retpoŝte: gsutton@computekmail.co.uk. Material

may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

□ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto.

☆

□ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the **Universal Esperanto Association**, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas leĝe registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de **Universala Esperanto-Asocio (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / retpoŝte: uea@uea.org; www.uea.org)**, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

☆

□ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimitaj en *EAB-Ĝisdate* ne nepre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.

*Report from the June meeting***Summer was on a Saturday this year ...**

Regular readers of this column will remember that every year, usually in June, your trustees (Management Committee, affectionately known as 'Mancom') have a weekend meeting in Barlaston. That allows us to review the whole range of issues facing the Association and give a more time to each bit of the agenda. It also allows us to get to know one another better, which is especially useful for new trustees. This year, 11–13 June, we were lucky with the weather; although we were in the Butler Library most of the time, it is pleasant to see blue skies out the window, and to enjoy the fine weather between sessions.

This year we were very aware that David and Jean Bisset had stood down as trustees, but had not been replaced by new candidates, leaving us a bit short-handed. John Wells agreed to hold the library brief temporarily, while we explore possibilities; of course, Geoffrey King, Hon. Librarian, continues to look after the 'bibliographic' side of things. We also agreed that your 'umble secretary should write a piece for *EAB Update*, encouraging people to get more involved (see page 4), whether as trustees or as active members, for example in publicity or on the education side; and individual trustees will have a quiet word with individuals who they think have something to offer ... You have been warned.

**Book service and finance**

Joyce Bunting agreed to take on the second-hand book service, which Jean Bisset looked after. As Joyce already looks after the

main book service, that should fit in well, especially as it's likely that Joyce will be easing out of some of her financial responsibilities over the next year or so. Clare Hunter, who is a chartered accountant, is discussing with Joyce and others how we might best organise the financial side of our affairs. Again, anyone who has particular expertise on the financial side, and would like to help, do please contact Clare or me, through Esperanto House, if you don't have our e-mail addresses.

**Grim times**

Talking of money ... you may have noticed that things are quite grim on the financial front. Interest rates are at an all-time low and the stock market still hasn't recovered from its fall of a couple of years back (nor indeed from the one before that). As a result, we have recorded our first deficit for a long time, and Joyce is having to keep a keen eye on cash-flow. We did manage to move some money into equities at the bottom of the market, which was clever (or lucky?) and brought some welcome relief.

**Wedgwood Memorial College**

As I write (early July), still nothing definite about the future of Wedgwood College, but we are expecting some news fairly soon. The number of students at the college is visibly down, so a certain pessimism prevails. We are, though, in regular contact with the senior officers responsible for the Review, and they have promised to consult us as soon as there is something concrete to consult on. Hm!

**50th anniversary**

On a more positive note – Somera Festivalo, previously the Summer School, celebrated its 50th anniversary this year. The Association contributed to the cost of a celebratory lunch in August (see pp. 1–2), when Marjorie Boulton, founder and *grande dame* of the summer school, was the guest of honour. Some time ago, Hilda Jones, a local member of many years, brought to our attention that the bust of Ludwik Zamenhof, by Barbara Tribe, hitherto on display in the Stoke-on-Trent Museum, is now in store. We managed to borrow it for the jubilee celebration (see top picture opposite, right).

**An impressive story**

Angela Tellier (assiduous readers will already be aware) now reports direct to the trustees on education matters (previously, notionally through David Kelso). She took this occasion to review that side of the Association's work, over the past six years or so, since she took over. It's an impressive story – not just Springboard, but correspondence courses and examinations as well – and the Management Committee congratulated her warmly. Angela was at pains to emphasise the big contribution made by lots of others – tutors, 'buddies', Viv O'Dunne at Head Office and all the Peter Olivers and Simon Davies of this world who work away quietly, without fanfare.

Angela also works closely with Edmund Grimley Evans (and accomplices) on a continuing stream of publications, mainly educational in nature.

Probably the most obvious in recent times has been the 'Mini' series – Dictionary, Course, Grammar so far, but with some others under consideration. Many members will be interested

to hear that Angela and chums are thinking about a new edition or revision of Montague Butler's *Step by Step*, now out of print. I have very fond memories of that work, as I'm sure many do.

## ***Food for thought ... and action?***

Many members will have noticed that for some years now, we haven't had a contested election for the Management Committee (Mancom) – for membership of Mancom, that is, rather than the presidency. When someone steps down, more often than not, the trustees invite someone else to stand for election; or, if it's between AGMs, we co-opt, until the next AGM.

It just so happens that this year *two* trustees – David and Jean Bisset – stood down at the same time, and too close to the AGM for us to do anything about it. So, at our annual 'planning weekend' in June, we were only six. Actually, that's a good number for getting through the business, but it doesn't leave much of a margin for eventualities, and is quite a small number of hands to cover the wide range of association business.

We discussed the issue during the weekend (as mentioned in the summary of our meeting, on pages 3–5) and identified a number of members who might be suitable as, and interested in being, trustees – or, indeed, in doing something else in the Association. We shall be speaking to those individuals to see whether indeed they would like to get more involved – but, you know, those are just the names that occurred to us at the time. How many others are there 'out there' who would like to be more involved?

EAB is, and must remain, a *voluntary* organisation, which means that the overwhelming bulk of our activity is carried out by volunteers, i.e. members, like thee and me. Without all that input, there wouldn't be an Esperanto community in Britain. So, it is absolutely imperative that we mobilise all the voluntary enthusiasm we can. Some years back, I invited members (and supporters) to put their names forward for a 'Volunteer Network'. About 70 people responded – not bad, I reckon – and that has been an invaluable source of names for tutors, translators, 'buddies', speakers, interviewees and other volunteer roles. However, time has passed, we are all a bit older than we were, and there are quite a few new members who weren't around then (or were 'otherwise engaged').

So, if you would like to be more involved in the work of EAB, whether in tutoring, publicity, the library, book service, publications, finance, admin, internet, congresses, or something I haven't even thought of, do please let me know: contact details below. (One specific need: if anyone has significant expertise in the field of investment etc., do please let us know). And if you have any good ideas about how we might better organise ourselves, better deploy our resources, don't hesitate to let Mancom know, through me. *EAB is Us!*

David Kelso, Hon. Secretary  
 davidkelso@yahoo.co.uk  
 5 Craighenhill Road, Kilncadzow, Carlisle ML8 4QT

Edmund has also been busy, scanning the entire series of *Fonto*, the cultural review which ceased publication a year or two ago, digitising and transferring to a DVD, which is now available for a remarkably modest price (see *EAB Update*, No.50, p.19). How long does it take to scan 30-years' worth of a magazine? – quite an achievement.

### **NoJEF**

When the Norwich Jubilee Esperanto Foundation (NoJEF) was set up, in 1967, EAB (at that time, BEA) wasn't a registered charity, so NoJEF had to set up as a separate body, although its trustees are nominated by EAB. Now that EAB is a registered charity, David Kelso, secretary of both, wondered whether they might not work more closely together. The Management Committee agreed that this would make sense and asked me (I've an identity problem here) to discuss possibilities with the NoJEF trustees.

### **Mags and webs**

Clare Hunter now 'liaises' with our editors (Geoffrey Sutton, Paul Gubbins and Simon Davies) and with our webmaster, Bill Walker. Conscious of the enormous amount of work that they all put in, for almost no recompense, we decided it would be appropriate that they be offered free participation in the annual British Congress, as a modest recognition of their work. Don't worry, LKK! The Association will bear the cost, not the congress budget! Clare is going to discuss with Bill and with other webmasters (Matthew Tellier, Tim Morley, Hugh Reid) whether we couldn't develop better links between the various sites, perhaps using 'content management' software.

### **Publicity**

Publicity is a continuing concern. Geoffrey Greatrex has arranged >

# Raporto el la Universala Kongreso de Esperanto en Havano, Kubo



Fotio de Terry Page

Dum la Solena Inaŭguro de la 95a Universala Kongreso de Esperanto, la 18an de julio, en Havano, Kubo. Aliĝis entute 1,002 homoj el 59 landoj.

> for an initial print-run of the new 24-page booklet *Discover Esperanto*, developed internationally and translated into English by Simon Davies, so we can see how popular it proves to be before printing great quantities. Geoffrey is also hopeful of producing a replacement for the Free Postal Course, in concert with Angela. We agreed that we shouldn't automatically pre-book a stall at the Language Show every year (it's expensive) but should ask Helen Fantom, who co-ordinates that for us, to review the options: maybe every other year?

## UEA

Helen is stepping down as our representative on the Komitato of UEA; Geoffrey Sutton is taking her place, with Geoffrey Greatrex as alternate. Both Geoffreys, and Terry Page, looked after our

modest presence at the *Movada Foiro* in Havana World Congress – hopefully with help from other participants from Britain.

## Esperanto House, membership, book sales

Viv O'Dunne joined us on the Sunday morning (over and above the call of duty) to update us on the work in Esperanto House. Membership is down slightly this year (after holding up last year) but book-sales are healthy – especially John Wells's new dictionary, which sold very well indeed in Llandudno. Viv has already taken over some of Joyce's work, on the financial side, and helps a lot with administration aspects of both education and publicity.

And that was about it, apart from all the usual nuts and bolts.

David Kelso, Hon. Secretary

Al la ĉi-jara Universala Kongreso aliĝis 17 homoj kun adreso en Britio. Kial nur tiom? Tion demandu ne al mi, sed al la forrestintoj! (La koncerna cifero por Francio estas, parenteze, 110). Estante unu el la malpli-ol-17 britianoj, kiuj ne nur aliĝis, sed ankaŭ alvenis en Havano, mi dividos kun vi, se al vi tio plaĉus, kelkajn tiurilatajn spertojn kaj impresojn.

## Trans la magia nombro

Partoprenantoj en Universala Kongreso de Esperanto normale aliĝas plurajn semajnojn, eĉ kelkajn monatojn, antaŭ ĝia komenco. Foje tamen, pro specialaj cirkonstancoj, iu devas malfrue aliĝi, eble dum la kongresa semajno mem. Ĝuste tiel aliĝis kuba samideano, s-ro Nelson Ramos, kies alvenon oni anoncis per la sesa kaj lasta numero de la ĉi-jara kongresa kuriero, asonance nomita *Havana Karavano*. Al s-ro Ramos oni donis la kongresnumeron 1 000, tiel pruvante, ke la nombro de aliĝoj ja atingis (kaj, pro du kromaj malfruaj alvenoj, poste superis) la magian nombron mil.

## “... homoj revas koni ...”

Ke la plimulto de tiuj pli-ol-mil kongresanoj ege ĝuis sian restadon en Havano kaj partoprenon en la 95a UK, tion mi neniel dubas. Jes, okazis kelkaj fuŝetoj, por iuj certe tre ĝenaj, sed post hejmeniro oni emas ilin forgesi kaj memori nur pozitivajn ecojn de la ĉi-jaraj kongresa lando, kongresurbo kaj kongresa programo.

“Kubo ... estas unu el tiuj partoj de la mondo, kiujn homoj revas koni pro iliaj naturo, arkitekturo, homa diverseco kaj historio” diras prave la anonima verkinto de invito al antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj. La ‘diversaj homoj’, kiuj konsistigis la Lokan Kongresan Komitaton kaj ties helpantaron, faradis entuziasme, amikeme kaj

*Hilary Chapman salutas la kongresanaron nome de Esperanto-Asocio de Britio, kaj (sube) bildo de parto de la kongresejo.*



diligente ĉion eblan por igi la 95an Universalan Kongreson de Esperanto agrabla, sukcesa kaj memorinda.

#### Granda elekteblo

Priskribi detale ĉion, kio okazis dum la kongresa semajno, neniel eblas: por eĉ listigi ĉiujn solenaĵojn, kunvenojn, diskutojn, prelegojn, koncertojn ktp ne sufiĉus la disponebla paĝospaco. Do afable permesu, ke mi raportu pri nur kelkaj elektitaj programeroj, nome tiuj, en kiuj rolis brito(j), aŭ kiujn mi subjektive trovis plaĉaj kaj/aŭ interesaj.

#### Antaŭ- kaj post-kongresoj

El la du proponitaj antaŭ-kongresaj ekskursoj nur unu okazis en Kubo mem, la alia en ne-tre-fora – sed malpli facile alirebla – Gvatemalo. Partoprenis en ĝi malmultaj homoj, sed tiuj estis laŭdire tre kontentaj pri sia vizito kaj ekono kun la majaa kulturo. En la alia, nomita “Kubo, okcidento kaj centro – Naturo kaj historio” mi partoprenis mem, kaj sentas (sed rezistas!) fortan tenton detale priskribi la belajn kaj historie interesajn lokojn, kiujn en kvar

mallongaj tagoj ni vizitis kaj esploris. Viñales, Cienfuegos, Trinidad – se iel ajn eble, plenumu iam per mema vizito ankaŭ viajn revojn! (Tuj post la fino de la kongreso ni forflugis hejmen, kaj do pri ekskursoj post-kongresaj povas nenion signifan diri.)

#### Kongresejo

*Palacio de las Convenciones de La Habana* (La Kongresa Palaco de Havano) estas granda, nova kaj, por gastigi UKon, taŭga

konstruaĵo. Ĝiajn kelkajn mankojn – klimatizilojn ĝene bruajn, seĝvicojn kiuj falis surplanken kiam oni provis sidiĝi – nur spegulas problemojn, kiuj estas por ordinara kubano ĉiutagaĵoj, kaj do de vizitanto facile pardoneblaj. Tie estas je ĉies dispono ne nur sufiĉo da giĉetoj, kunvenĉambroj kaj prelegejoj diversgrandaj, sed ankaŭ memserva restoracio, kaj baroj kie oni povas ricevi – kontraŭ malgranda pago – bongustan kuban bieron, kaj (senpage) senliman, senkoston trinkakvon – en la tiea somera varmo ofte kaj ege bezonata.

#### Movada foiro kaj interkona vespero

La ĵusa UK komenciĝis, iom paradokse, antaŭ ol oni ĝin malfermis. Sabaton vespere okazis Movada Foiro, en kiu landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj etskale reklamis siajn celojn kaj atingojn. Sur eta tablo, unu al ĉirkaŭ cent tiaj, staris do karto kun la vortoj ‘Esperanto-Asocio de Britio’, por indiki, al kiu apartenas la apuda sortimento da reklamiloj kaj kurs-materialoj por la lerneja projekto *Springboard* (alinome Lingvolanĉilo) kaj kompaktdisko kun tekstoj de la beletra revuo *Fonto*. Ke tio

#### *Solidareco kun la Tria Mondo*

- Partoprenantoj malavare donacis monon, por ke kubaj esperantistoj ĉe la UK povu aĉeti librojn. Ĉiu el la pli-ol-160 kubaj kongresanoj ricevis pagilon je la valoro de 33 konverteblaj pesoj (prok. £22), kiun ili povis interŝanĝi sole kontraŭ librojn en la kongresa libroservo. Tion ili faris kun granda entuziasmo.
- Martin Schäffer organizis kune kun ILEI (instruistoj) kaj TEJO (junularo) konkurson por doni stipendiojn al 19 latin-amerikanoj, kiuj parte povis ĝui la Esperanto-etoson en Kubo dum minimume du – ĝenerale eĉ tri – semajnoj. La plej granda parto el ili partoprenis seminarion kaj lingvokurson dum la ILEI-konferenco.

La Universala Kongreso pro tio havis gastojn el tre maloftaj partoprenantlandoj (Bolivio, Dominika Respubliko, Ekvadoro, Haitio, Nikaragvo, Urugvajo, Venezuelo). Kelkajn landojn oni reprezentis unuafoje. Aparte ĝojinda estis tio, ke povis partopreni Christine Theano el Haitio; ŝi estis inter la viktimoj de la terura tertremo de januaro 2010.

- Krome, oni kolektis ludilojn por malprivilegiaj infanoj.

ja interesis vizitajn kongresanojn atestas la granda kvanto da demandoj, kiujn devis respondi deĵorantaj Geoffrey Greatrex kaj Anica Page. Samtempe kaj sameje oni povis (re)interkonatiĝi, aŭskulti spontaneajn prezentojn parolajn kaj, iom pli poste, vikle danci. Multaj devis tamen tro frue rezigni pri tiu laste menciita plezuro, kiam oni eksciis, ke busoj, per kiuj oni reiras al foraj hoteloj, foriros de la kongresejo antaŭ la fino de la vespera programo. (Jen unu el la 'kelkaj fuŝetoj', kiujn mi supre aludis.)

### Solena Inaŭguro

Tiuj, kiuj jam partoprenis en UK ja scias, kion atendi: festparolado, salutoj, informoj pri kernaj programeroj: la 95a neniel surprizis.

UEA-Prezidanto Probal Dasgupta diris, ke por interproksimigo de kulturoj gravas similecoj kaj malsimilecoj, kontrastoj kaj malkontrastoj. Louis Zaleski Zamenhof sendis salutmesagon, " ... kelkajn vortojn de maljuna nepo de Avo eterne juna." Geoffrey Greatrex prezentis al ni la Kongresan Temon "Interproksimigo de kulturoj" – sole, ĉar lia kunrespondeculo Duncan Charters ne superis barilojn, kiujn Usono starigas kontraŭ ĉiu sia civitano, kiu ial deziras viziti Kubon. Sur la podion venadis reprezentantoj de preskaŭ ĉiu el la 59 landoj kun almenaŭ unu ĉeestanta kongresano. En la nomo de Esperanto-Asocio de Britio salutis la kongreson Hilary Chapman, Ĉefdelegito de UEA en nia lando. Li konfesis, ke Britio (aŭ, pli precize, Anglio) estas la lulilo de la angla lingvo, kaj asertis, ke malgraŭ tio ja okazas en nia lando Esperanto-aranĝoj, ĉe kiuj vizitantoj el aliaj landoj estas ĉiam aparte bonvenaj.

### Programeroj kulturaj, edukaj, prisociaj ...

En preskaŭ ĉiu momento de ĉiu kongresa tago (krom merkredo,

rezervita por tuttagaj ekskursoj) okazis samtempe de kvin ĝis sep kunvenoj, prezentoj aŭ prelegoj. Tiel variaj kaj interesaj, ke foje mi devis rezigni pri dezirata partopreno, favore al plidezirata. Tiu fenomeno estas komuna al ĉiuj UKoj, sed en Havano troviĝis kroma ingredienco: la emo de ŝajne ĉiu kubano muziki, kanti kaj danci. Tion oni kun plezuro rimarkis ne nur en pluraj vesperaj koncertoj sed ankaŭ en la kongreseja kafejo, kie okazadis preskaŭ-konstanta kabaredo. Neforgeseble!

### Solena Fermo

Multe tro frue alvenis sabato kaj la Solena Fermo. Oni dum ĝi informis nin pri la Kongresa Rezolucio, kiu deklaris la deziron

de Esperanto-parolantoj kunagi kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por stimuli komprenemon inter popoloj, kaj samtempe protekti la identecon de ĉiuj homgrupoj. Ni eksciis pri la rezultoj de la Belartaj Konkursoj, kaj decidoj de gravaj fondaĵoj. Por ni britianoj estis ĝojige aŭdi, ke en la kategorio 'Prozo' nia Edmund Grimley Evans, unu el 30 konkursintaj aŭtoroj, gajnis Unuan Premion por sia verko *En Katedralo*, kaj ke Fondaĵo Grabowski aljuĝis al Geoffrey Sutton grandan monpremion pro lia anglalingva *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. Gratulindas ili, gratulindas ankaŭ ĉiuj, kies ideoj kaj laboroj kontribuis al la sukceso de la ĉi-jara Universala

Kongreso de Esperanto.

Terry Page



La verkinto trovis kuban amikon – klare ne Esperanto-parolantan.

## AMERIKO

## AMERICA

# Sudamerika informvojaĝo

## Projekto 'Esperanto al Ameriko' komenciĝis

**J**e la 8a de julio, Anneleen Nys, 23-jaraĝa belga esperantistino, komencis inform-, preleg- kaj instru-vojaĝon tra diversaj landoj de Centra kaj Suda Ameriko. Anneleen ĵus finis la magistran gradon en komunikadsciencoj en Universitato de Barcelono. La tezo temis pri civitanaj radioj en Sudameriko. Esplorojn rilate al tiu temo ŝi faris en Ekvadoro.

Celo de la vojaĝo estas ankaŭ kontakti izolulojn, kiuj nun-

tempe lernas Esperanton per la reto en Ameriko.

Komence ŝi vojaĝis al Kubo por tie partopreni la ILEI-konferencon kaj la seminarion pri Interkultura Agado, la Universalan Kongreson en Havano kaj la Internacian Junularan Kongreson en Los Cocos.

Venonta vojaĝplano enhavos Meksikon, kie ŝi vizitos diversajn urbojn por helpi al la tiea movado.

>>>

## The Cornish language and Esperanto

Hilary Chapman



In the huge *Festschrift* (901 pp.) to Humphrey Tonkin, *La arto labori kune*, published earlier this year by UEA, there is an article by Kimura Goro Christoph entitled “La Kornvala kaj Esperanto: Entreprenoj similaj?”. Here the author compares the situation of Esperanto with that of the revived Cornish tongue.

Esperanto is frequently compared to Hebrew, but Christoph sees closer parallels with the Celtic tongue which had ceased to be spoken, then was revived by enthusiasts in the early 20th century. Just as Esperanto had its ‘Unua Libro’, Cornish today owes much to Henry Jenner’s textbook of 1904.

Learners of Cornish often meet in private homes to be taught by volunteer tutors – as is the case for Esperanto. In both cases, the vast majority of speakers opt in to speak the new languages. Neither is normally taken up for practical reasons or to improve employability. A movement building the language and promoting it is characteristic

of both. Both languages are not restricted to one ethnic group. Unlike the situation of Irish, which has its Gaeltacht where speakers live alongside one another, there are no locally based communities of Cornish- or Esperanto-speakers. For both languages it is not possible to draw a map showing the territory in which the speaker population lives. It is only possible to show where individual speakers live and where courses or meetings take place. Each language has its own version of the *interna ideo* which motivates learners and speakers. Both languages, according to Christoph, favour creativity in language use.

Christoph suggests that the movements for the languages can and should learn from one another. Cornish has been the subject of sociolinguistic studies, in 2008, for example. He further suggests that the research tools and questionnaires used for Cornish could be adapted to discover more about Esperanto-speakers.



The Cornish language has suffered from schisms about what real and authentic modern Cornish looks like. Christoph refers to the publication in 1986 of a revised version of the language. In further developments the relatively small movement split into rival factions strongly critical of one another. The Cornish activists could, Christoph suggests, learn from Esperanto’s *netuŝebla fundamento*. Christoph does not report that the unnamed writer of the reformed United Cornish (Common Cornish) was Ken George, son of Esperanto-speakers from Torpoint, Victor and Beryl George. One wonders whether Ken George’s knowledge of Esperanto influenced him in his systematic linguistic work. □

> Poste ŝi vojaĝos tra Gvatemalo, Salvadoro, Nikaragvo al Ekvadoro, Peruo kaj Bolivio por disvastigi Esperanton en regionoj, kie ĝi – ĝis nun – ne aŭ preskaŭ ne ekzistas.

Ŝi estas entuziasma, kaj ŝi petas la helpon – moralan kaj finan – de la Esperanto-movado. Ŝi jam nun ĝojas renkonti interesajn homojn el la tuta kontinento por informi ilin pri Esperanto, kunlaborante kun la lokaj esperantistoj.

Ŝiajn aventurojn vi povos sekvi en la blogo: <http://annelunake.ipernity.com>.

La vojaĝon organizis la amerika aktivulo Martin Schäffer,

membro de la Amerika Komisiono de UEA ([www.ameriko.org/eo](http://www.ameriko.org/eo)).

Donacojn Anneleen kaj Martin petas al Fondajo Ameriko de UEA (menciu: Esperanto al Ameriko) aŭ al la germana konto de Fondajo Mondo, Hauptstrasse 42, DE-64753 Brombachtal (IBAN DE21600901000151100004, BIC: VOBADDESS).

Por havi pliajn informojn kontaktu: [stiftungmondo@gmail.com](mailto:stiftungmondo@gmail.com).

La de multaj sopirata projekto ‘Esperanto al Ameriko’ komenciĝis. Ni helpu ĝin ĉiumaniere, sed ĉefe finance kaj per trovado de subtenantoj. □



Anneleen Nys en Centra Ameriko



La Brita Kongreso – okazigi kunsidon de delegitoj

Estimataj,

Mi ĝojis legi en *Usona Esperantisto*, ke en la ĉi-jara kongreso de Esperanto-USA okazis i.a. akcepto por delegitoj de UEA. Mi kore dankas pro tio! Ankaŭ en la japana Esperanto-kongreso tradicie okazas kunsido de delegitoj. Jen kaj jen ĝi okazas ankaŭ en aliaj landaj kongresoj, sed laŭ mia scio ĝi ne estas regula programero en aliaj landoj.

Mi instigas okazigi kunsidon de delegitoj en landaj kongresoj. Certe en ĉiu el ili partoprenas delegitoj, ĉar ili estas la plej aktiva parto de esperantistoj. Ilia kunsido per si mem altiras atenton al la Delegita Reto kaj igas aliajn interesiĝi pri delegitiĝo. Naturaj temoj por la kunsido estas pligrandigo de la delegitaro, interŝanĝo de spertoj kaj kovado de ideoj por evoluigi la Delegitan Reton kaj por trovi novajn eblojn por ĝia utiligo.

La nombro de delegitoj malkreskas. Parte tion kaŭzis la malkresko de la membraro; delegitoj ja devas esti individuaj membroj. Temas tamen ankaŭ pri neglekto, indiferento kaj la penso, ke la interreto faris la Delegitan Reton eksmoda. Ĝi tamen estas unu el la plej brilaj ideoj inventitaj en la historio de Esperanto. Ĝi estas la plej vasta horizontala strukturo en Esperantujo kaj ĝi havas potencialon por esti utiligata en novaj manieroj apud la tradiciaj. Kiel mi diris, la delegitaro estas la plej aktiva grupo inter ni. Oni fariĝas delegito libervole kaj plej ofte meminciate. Tial la delegitoj estas tiu parto de UEA, kies motiviĝo estas la plej granda. Tiajn homojn ni mobilizu pli ol ĝis nun, anstataŭ perdi tempon por sendi nelegitajn cirkulerojn, mesaĝojn kaj agadplanojn al apatiuloj, eĉ se tiuj ĉi formale estus la plej gravaj.

Osmo Buller

## Informado pri Esperanta literaturo en bibliotekoj

Eldonejo Mondial informas, ke helpe de la 'worldcat'-ligo ([www.worldcat.org/isbn/1595690905](http://www.worldcat.org/isbn/1595690905)), eblas eltrovi, kiuj (\*22) bibliotekoj en kiuj landoj disponas pri ekzemplero de *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*.

Ili estas (laŭ la anglalingva listo):

New York Public Library, New York, USA.  
 Yale University Sterling Memorial Library, New Haven, CT, USA.  
 University of Pennsylvania Library, Philadelphia, PA, USA  
 University of Hartford (W.H. Mortensen & Allen libraries), West Hartford, CT, USA.  
 Harvard University, Harvard College Library, Cambridge, MA, USA.  
 Library of Congress, Washington, DC, USA.  
 James Branch Cabell Library, Virginia Commonwealth University James Branch Cabell Library, Richmond, VA, USA.  
 Carnegie Library of Pittsburgh, PA, USA.  
 Duke University Library, Durham, NC, USA,  
 University of North Carolina, Chapel Hill, NC, USA.  
 Biblioteca Nacional de España, Madrid, Spain.  
 University of Cincinnati, OH, USA.  
 Mount Allison University Libraries, Sackville, NB, Canada.  
 University of Louisville, Ekstrom Library, KY, USA.  
 University of Georgia, Main Library, Athens, GA, USA.  
 Wichita State University, Ablah Library, KS, USA.  
 Simon Fraser University, Burnaby, BC, Canada.  
 University of British Columbia Library, Vancouver, BC, Canada.  
 University of California, San Diego, La Jolla, CA, USA.  
 Vancouver Public Library, BC, Canada.  
 Alibris, Emeryville, CA, USA.  
 University of California, Santa Cruz, CA, USA.  
 The British Library, British National Bibliography, Wetherby, W. Yorks., UK.  
 The British Library, St. Pancras, London, UK.  
 Cambridge University Library, UK.  
 University of Oxford, UK.  
 Bibliotheek Universiteit van Amsterdam, Netherlands.  
 Koninklijke Bibliotheek, Den Haag, Netherlands.  
 Zeeuwse Bibliotheek Middelburg, Netherlands.  
 Universität Bern, Switzerland.  
 Zentralbibliothek Zürich, Switzerland.  
 State Library of NSW Dixson Library, Sydney, Australia.

\*Ni scias, tamen, ke la supra listo ne estas kompleta.

Ekzemplero troviĝas ankaŭ en la bibliotekoj de la universitatoj de Liverpolo, Manĉestro kaj East Anglia (Norwich), krom la urba biblioteko de Skipton, la altlernejo Cokethorpe (apud Witney), unu kredeble en sudafrika universitato – kaj verŝajne ankaŭ en aliaj, pri kiuj ni ne scias. Ni volonte ricevas de vi kompletigajn informojn.

La plimulto aĉetis ĝin – krom nur du aŭ tri bibliotekoj, kiuj ricevis ĝin senpage. Se vi havas kontakton kun grava biblioteko, eble nomon kaj retadreson, eldonejo Mondial povus fari al ĝi relative malmultekostan oferton. Kontaktadreso: [info@librejo.com](mailto:info@librejo.com). □



### Festa numero de *Kial Ne?*

Kara redaktoro,

Mi ĝojas sciigi vin, kaj eventuale la gelegantojn de *EAB-Ĝisdate*, ke nun haveblas kiel PDF-

dosiero la Festa Numero de *Kial Ne?*, kiu datumas de la jaro 1978. Tiutempe (se mia memoro efikas) mi estis la prezidanto de JEB, kaj la revuon mi redaktis tute mane.

Elŝuteblas ĝi ĉi tie: [www.fileserve.com/file/SbdrHDK](http://www.fileserve.com/file/SbdrHDK) aŭ ĉi

tie: [http://kewlshare.com/dl/958aee17169c/Kial\\_Ne\\_-\\_Festa\\_Numero\\_\(1978\)\\_-\\_12Mb.pdf.html](http://kewlshare.com/dl/958aee17169c/Kial_Ne_-_Festa_Numero_(1978)_-_12Mb.pdf.html).

Se la dosiero estas tro granda, gelegantoj bonvolu peti, ke mi sendu ĝin retmesaĝe kiel diversaj pli malgrandaj pecoj.

Ian (Jano) Carter,  
Chesterfield



### “Florbedo de la Espero”

Estimataj,

Antaŭ ĉirkaŭ 50 jaroj, mi estis medicina studento kaj esperis ornamo ĝardenon de nia fakultato per floroj. Mi sendis leterojn al diversaj landaj Esperanto-oficejoj.

## **Kenja lernejo konsentis, ke oni instruu Esperanton**

Nun la loka esperantisto serĉas lernomaterialojn en la angla por komencantoj. Se vi volas kaj povas helpi, bonvolu sendi al la ĉi-suba adreso unu lernolibreton en la angla (tio ne devus kosti tro multe). Ne estu tro elektema, ĉio estas pli bona ol nenio.

Bonvolu *ne* atentigi pri la ekzisto de materialoj en la reto. Tie ni estas en situacio, en kiu nur la malnovaj paperaj libroj povas helpi (manko de kunligo, manko de ebleco elprinti, kaj manko de mono por elprinti, se ekzistus ebleco).

Evans Ochoki, P.O. Box 1012, 30100 Eldoret, Kenjo.

EAB jam sendis lernolibrojn kaj vortarojn kaj la ‘Mini’-libretaron. Almenaŭ same gravas sendi taŭgajn informilojn; daŭrigo ofte dependas de taŭga scio.

Multajn leterojn kaj semojn ricevinte (241 leterojn kaj 332 semsaketojn el 27 landoj inter 1957 kaj 2006), mi kaj medicinaj studentoj ĉiujare semis kaj semis tiujn. Ili kreskis kaj floris tre bele, kaj montris la spiriton de sendintoj al niaj studentoj. Danke ni respondis kaj sendis fotojn de floroj al la sendintoj ĉiufoje.

Sed iom post iom semoj perdiĝis, kiel daŭra poemo de nia kara Majstro, kaj nun restas nur du specioj.

*Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas | Ni semas kaj semas konstante.* L.L. Zamenhof.

Ni denove esperas ornamo la fakultaton per via afabla spirito. Se nia entrepreno interesas vin, bonvolu sendi semojn al mia postvenantino: D-rino FURUMOTO Reiko, La Unua Biokemio, Medicina Fakultato, Universitato Yamaguti, UBE, Yamaguti-ken, Japanio.

Hatanori Ogata,  
Japanio



### Vojaĝo en Britio?

Saluton,

Je la komenco de la jaro 2011 mi gajnos monon por miaj Esperanto-kantoj ĉe Vinilkosmo (bv. viziti mian tt-paĝon: [www.ipernity.com/home/d.mayoma](http://www.ipernity.com/home/d.mayoma)).

Pro tio, mi havas projekton vojaĝi en Eŭropo, tial mi proponas al vi mian vojaĝon en Britio por daŭrigi kanti kaj surbendigi miajn aliajn Esperanto-kantojn.

Ĉu vi sukcesos helpi min trovi iun por gastigi min dum mia tuta restado en Britio dum almenaŭ du (aŭ unu) monatoj?

Mi ŝatus vojaĝi ekde la 23a de marto ĝis la 24a de aprilo 2011.

Ĉu vi sukcesos sendi al mi invitleteron?

Théophile Mayoma-  
Diankembo, Kinŝaso,  
Dem. Resp. Kongo  
([www.ipernity.com/home/d.mayoma](http://www.ipernity.com/home/d.mayoma))

## MALLONGE

## IN SHORT

### • Literatura premio unuaklasa

Gratulon al Edmund Grimley Evans, kiu gajnis la Unuan Premion por Prozo pro sia “En Katedralo” en la Belartaj Konkursoj de UEA ĉe la ĵusa Universala Kongreso de Esperanto en Havano.

### • Much media interest

Esperanto was mentioned on the BBC Radio 4 programme *Ramblings*, on 10 June, p.m. ([www.bbc.co.uk/iplayer/episode/b00sknj8/Ramblings\\_Series\\_15\\_Episode\\_3](http://www.bbc.co.uk/iplayer/episode/b00sknj8/Ramblings_Series_15_Episode_3)). Congratulats to Sally Phillips, “a keen Esperanto-speaker” – and walker.

Later, a press release by Brian Barker on ‘Esperanto Day’ (26 July) stimulated a flurry of media interest. *The Sun* asked to speak to a teenager. An article appeared on 27 July ([www.thesun.co.uk/sol/homepage/features/3069789/Made-up-language-gets-internet-boost](http://www.thesun.co.uk/sol/homepage/features/3069789/Made-up-language-gets-internet-boost)).

Stephen Thompson was interviewed by BBC Radio Lancashire ([www.bbc.co.uk/iplayer/console/p008xxw0-2:20:46](http://www.bbc.co.uk/iplayer/console/p008xxw0-2:20:46) into the programme), and Brian Barker on Radio Somerset ([www.bbc.co.uk/iplayer/console/p008xw79-39:35](http://www.bbc.co.uk/iplayer/console/p008xw79-39:35)). Radio Leicester interviewed Tim Owen ([www.bbc.co.uk/iplayer/console/p008xwbq-1:12:30](http://www.bbc.co.uk/iplayer/console/p008xwbq-1:12:30)); Stela Besenyei had pre-recorded some Esperanto phrases to be played during the feature. Radio Sussex then interviewed Stela in Brighton. John Murray was also interviewed on Radio Foyle, Northern Ireland ([www.bbc.co.uk/iplayer/console/b00t6pt3-1:23:35](http://www.bbc.co.uk/iplayer/console/b00t6pt3-1:23:35)). David Kelso appeared on Radio

Humberside ([www.bbc.co.uk/iplayer/console/p008xwh7-1:40](http://www.bbc.co.uk/iplayer/console/p008xwh7-1:40)).

It is not known whether the BBC World Service went ahead with a proposed feature on Esperanto.

Quite a successful day – and many congratulations to Brian and all who took part.

Paul Gubbins also gave a series of live and recorded broadcasts on BBC local radio stations on 7 August. They were on 5live, Cornwall, Derby, Devon, H&W, Humberside, Jersey, Lancashire, Lincolnshire, Manchester, Merseyside, Newcastle, Northampton, Scotland, Shropshire and Stoke.

On the morning of 7 August, Paul is reported to have spoken “extremely eloquently” on the programme *Saturday Live* – 27th to 35th minute approximately).

BBC Radio 4 also broadcast an item on the *You and Yours* show from midday on 31 August on ‘Why learn another language’. They requested listeners to phone in and e-mail. There was also a mention on the *Today* programme of the same station.

An interview with Trevor Simpson of Bournemouth was broadcast by Radio Solent on Monday, 13 September ([www.bournemouthcho.co.uk/news/features/8361272.Ni\\_parolas\\_Esperanton](http://www.bournemouthcho.co.uk/news/features/8361272.Ni_parolas_Esperanton)).

- **The British Esperantist online**  
The Internacia Esperanto-Muzeo, Vienna, part of the Österreichische Nationalbibliothek, have scanned the issues of *The British Esperantist* published between 1905 and '39, and placed them online at <http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?apm=0&aid=e1d>.

- **Venonta Azia Kongreso**  
Dum la ĵusa, 6a Azia Kongreso de Esperanto en Mongolio, la Komisiono de la Azia Esperanto-Movado (KAEM) decidis, ke la



*Pliaj fotoj el la jubilea festo en Barlastono (vidu paĝojn 1 kaj 2).  
Sub la grupfoto, Lidia Yerofeeva kaj Hilary Chapman (maldekstre) parolas kun Marjorie Boulton.*



Fotis Lidia Yerofeeva

venonta Azia Kongreso okazos en 2013 en Israelo. Ĝi samtempos kun la 120-jara jubilea festo de Oomoto en Jerusalemo kaj kun la 14a Israela Kongreso de Esperanto.

- **“Ege bona reklamo” ĵurnala *Le Monde*** – unu el la plej famaj ĉiutagaj ĵurnaloj de Francio – publikigis je la 10a de julio la antaŭparolon el la libro *Une colonie ordinaire du XXIe siècle* (Ĉiutaga kolonio de la 21a jarcento) de Michel Onfray, pri kiu anoncis *EAB-Ĝisdate* sur la frontpaĝo de sia pasinta numero. “Granda sukceso kaj por la eldona kooperativo kaj ege bona reklamo por Esperanto” raportis Frederiko Scibor.

- **Biblioteka kampanjo brazila**  
Ekde julio 2001, kiam oni lanĉis la kampanjon, estis donacitaj pli ol 1 000 libroj al 92 brazilaj kaj 12 alilandaj bibliotekoj, dank’ al la malavaro de deko da brazilaj esperantistoj, kiuj regule kontribuas al fonduso tiucele starigita. Respondecas pri la kampanjo Aloísio Sartorato kaj Maria das Graças Carâp.

- **Opinioj petataj por libro**  
Ester Schor – profesorino pri la angla literaturo en Universitato de Princeton, Usono – petas

opiniojn, versojn kaj anekdotojn por prepari sian libron pri la revo pri universala lingvo – <http://english.princeton.edu/poetry/faculty/esther-schor>.

Vidu ankaŭ: Esperanto ĉe Universitato de Roĉestro: Intervjuo kun d-ro Esther Schor <http://esperanto.lodestone.org/novajxoj/mojosajxo/wiw76.html>. Artikolo de Ester Schor en *The New Republic*: “L.L. Zamenhof and the Shadow People – The amazing story of how Esperanto came to be.” Angla-lingva video pri Ester Schor, preleganta en Novjorko dum simpozio, pri la temo “Zamenhof and the Shadow People” <http://esperanto-usa.org/en/node/1756/download> (22 min. 19 s.).

- **Skoltoj reaktiviĝas?**  
Skolta Esperanto-Ligo (SEL) preparas novan strategian agadplanon por memori pri sia 100-jariĝo en 2018. SEL, la plej malnova internacia skolta organizaĵo, planas agi en la kampoj de informado (ĉi-jare pri Esperanto en naciaj skoltaj medioj), trejnado (seminarioj por novaj aktivuloj en 2011) kaj aplikado (internacia skolta tendaro en 2012). SEL bezonas geesperantistojn, iamajn aŭ nunajn geskoltojn, kiuj volus

- **Ni estu solidaraj kun la tutmonda esperantistaro per membriĝo en UEA. Kune ni estas pli fortaj**
- **Membrecojn de EAB kaj UEA eblas pagi kune**

## UEA-kotizoj por 2011

Kerna servo de UEA estas organizi la ĉiujaran **Universalan Kongreson de Esperanto** (UK) tra la mondo, je kies kotizo individua membro ricevas *rabaton*. UEA funkciigas ankaŭ la plej grandan libroservon de Esperantaj libroj (pli ol 4 000 diversaj libroj kaj varoj). Plena katalogo kaj rekta mendebleco ĉe ttt-paĝaro [www.uea.org/katalogo](http://www.uea.org/katalogo). Individua ano de UEA rajtas mendi ĉe la **Libroservo de UEA kun rabato de 10%**! (Membro kun Gvidlibro aŭ Jarlibro ricevas la rabaton por du mendoj jare, aliaj por ĉiu mendo.) Plej grave, UEA agadas por Esperanto sur la monda scenejo. Por pli detalaj informoj, oni konsultu la **Jarlibron de UEA** kaj la **revuon Esperanto**, kiujn ricevas individujaj membroj.

### Fariĝi individua membro de UEA

Eblas pagi por individua membreco rekte al UEA per kreditkarto (Visa, Eurocard, Mastercard, Access aŭ American Express), al nederlanda poŝtgira konto 37 89 64 (Den Haag) aŭ al la banko Bank Mees Pierson, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam, Nederlando (konto 25.52.89.804).

Alternative, oni povas pagi al la brita Peranto de UEA, kiu akceptas britan ĉekon aŭ poŝtmandaton kondiĉe ke ĉi tiu estas skribita al 'EAB', kio ebligas pagi ankaŭ kotizon al EAB samtempe: EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887; retadreso: [eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org). (Oni ne sendu britan ĉekon rekte al UEA.)

En la okazo se vi estas **nova membro**, bonvolu doni viajn plenajn nomon, adreson kaj, se vi havas **29 aŭ malpli da jaroj**, ankaŭ vian naskiĝjaron\*. Ĉiuokaze bonvolu klare indiki la celon de la pago. Por aniĝi oni ne postulas plenigon de oficiala formularo.



### Kotizoj de UEA por 2011

MG/Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado .....	£8
MJ(-T*)/Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO* (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kun la revuo <i>Kontakto</i> sen plia abonpago) .....	£20
MA(-T*)/Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) + <i>Esperanto</i> 11-foje ....	£50
SA/Simpla abonanto al la revuo <i>Esperanto</i> sen membreco .....	£32
Kto/Abono al la revuo <i>Kontakto</i> 6-foje, sen membreco .....	£19
SZ/Societo Zamenhof: aldona, mecenata kategorio, kiu ne inkluzivas membrecon .....	£100

### Servoj: Kongresaj aliĝoj kaj aliaj pagoj

La Peranto (EAB) povas akcepti pagojn per debetkarto (prefere ol per kreditkarto) ankaŭ por la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj la Libroservo de UEA, por kiuj celoj la administreto de UEA eventuale malfermos por vi personan konton ĉe la Centra Oficejo (CO) en Nederlando. Bonvolu noti, ke la kongresajn kotizojn oni ne fiksas en pundoj, do ilia valoro varias laŭ la taga kurzo. Estas plej avantaĝe aliĝi antaŭ la antaŭa jarfino. La Peranto kutime disponas pri kongresaj aliĝiloj kaj la Unua Bulteno de la UK, sed ne pri libro-katalogoj.

**Aliĝu frue** al la UK en Kopenhago, Danlando, por ricevi **maksimuman rabaton: €160 antaŭ la 31-a de decembro por anoj de UEA, sed €200 por nemembroj.**

☆ **Universala Esperanto-Asocio:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.  
Tel. 00-31-10-436-1044; fakse: 00-31-10-436-1751; rete: [uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org); [sekretario@co.uea.org](mailto:sekretario@co.uea.org); [financoj@co.uea.org](mailto:financoj@co.uea.org); [kongresoj@co.uea.org](mailto:kongresoj@co.uea.org); [uk.mendoj@co.uea.org](mailto:uk.mendoj@co.uea.org); [libroservo@co.uea.org](mailto:libroservo@co.uea.org); ttt-paĝaro: [www.uea.org](http://www.uea.org)

loke kunlabori kun naciaj skolt-asocioj aŭ internacie ene de SEL. Se vi volas scii pli, bonvolu viziti <http://esperanto.org/skolta>, aŭ skribi al SEL per la retadreso <Reaktivigo@gmail.com>.

### • Kiel pluteni anojn

Dum aparte interesa kunveno de Landaj Asocioj ĉe la jusa UK en Havano, informis japanoj pri la sekva sia ideo por pluteni membrojn. Oni donacas al nova ano tri rabatkuponojn por libroj ks., kiuj estas uzablaj dum la unuaj tri jaroj de membreco: unu en la unua jaro, la dua en la dua, la tria en la tria jaro.

### • Esperanto-kursoj en Usono

De septembro ĝis decembro 2010 Steven Brewer instruas Esperanton en universitata kurso ĉe Universitato de Masaĉuseco – Amherst.

Kaj – fondita en 1970 fare de Catherine kaj William Schulze ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko – la trisemajna stud-programo NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto ĉe Universitato de Kalifornio, San-Diego) okazis por la 41a fojo, de junio ĝis julio 2010 (<http://esperanto.org/nask>).

• **Instruhelpo petata por lernejoj programoj de Ĉilio**  
Post la publikigo de Leĝo pri Ĝenerala Instruado, la ebleco instrui Esperanton en ĉiliaj lernejoj kaj gimnazioj estas tute malfermita.

Tiu ĉi ebleco nun dependas de la Eduka Komunumo kaj/aŭ estraranoj de la lernejo aŭ gimnazio mem, kiu devas prezenti projekton por instrui Esperanton kiel duan fremdan lingvon samrange kun la angla. La ĉi-lastata estas la plej vaste instruata lingvo. Krome instruataj lingvoj estas la germana, franca, itala kaj ĉina.

Nun oni petas helpon de la esperantistaro el tiuj landoj, kiuj jam posedas sperton pri



*Fine de aŭgusto, ne sole burundanoj, sed kvin esperantistoj el Kenjo kaj Ugando partoprenis mirinde enhavriĉan seminarion ĉe liceo en Bubanza. Dum la kvin tagoj naŭ homoj instruis la tuton de la kurso Gerda Malaperis. Malsupre: NTAHONSIGAYE Hasano (maldekstre), unu el la instruintoj, ankaŭ prelegis pri la historio de Esperanto en Burundo kaj problemoj en Afriko; (dekstre) MLOSSI Saidi, kunordiganto, ankaŭ instruis, kaj prelegis pri la strategio por starigi Esperanto-klubojn en lernejoj.*



## Indian-Chinese 'hiccups'

This is most of an article that appeared in the *Hindustan Times*, New Delhi, on 17 August, entitled "Lost in Translation".

The (Indian) Air Force's plans to hold its first-ever joint exercises with the Chinese Air Force have hit turbulence. The hiccup: language barriers. Plans may be afoot to conduct joint exercises with China's People's Liberation Army Air Force (PLAAF) in 2012, but top Air Force officers fear not knowing each other's language could be fatal in the skies.

A senior Air Force officer said: "Finding a way around language barriers is crucial if we have to conduct joint air manoeuvres with China. It is a huge hurdle."

He said English might be the international language of aviation but Chinese fighter pilots speak little or even no English. Hardly a tenth of China's pilots, many of who are ex-Chinese Air Force, meet international aviation English standards.

The problem of lack of proficiency in English would only be worsened by variations in accents and dialects, causing calls to be misinterpreted.

Air Force Vice Chief Air Marshal P.K. Barbor told *HT*: "Fighter pilots carry out close manoeuvres during such exercises. Not understanding each other can be dangerous for flight safety."

The Air Force has gone into a huddle to figure out how the language barriers can be overcome for the exercises to materialise. The drill is expected to offer Indian fighter pilots insights into the PLAAF's rising capabilities.

Here's how dangerous miscommunication can be: In 1993, Chinese pilots flying a US-made MD-80 were attempting to land in heavy fog at Urumqi in north-west China. They were flummoxed by an audio alarm from the plane's ground proximity warning system. Just before impact, the cockpit voice recorder picked up one crewmember asking another in Chinese: "What does 'pull up' mean?"

instruado kaj pri prilaboro de instruprogramoj por tri sinsekvaj lernojaroj, laŭ la leĝa postulo. Bonvolu kontakti per la retadreso: <[cursos@esperanto.cl](mailto:cursos@esperanto.cl)>.

• **Unua informo pri lerneja renkontiĝo en Turkio**  
Renkontiĝo kun turkiaj lernejoj kaj studentoj okazos en

*Daŭrigo sur paĝo 17*

# ***Second-hand books / Brokantaj libroj***

• The following prices include postage and packing / La sekvaj prezoj inkluzivas sendokostojn.

**Ĉu li bremsis sufiĉe?** Johán Valano [Claude Piron]. Krimromano verkita en Esperanto. Detektivo Jano Karal kaj nevo Stefano priesploras. La Laguna: Stafeto, 1979 (2a eld.). SB, 128p. £2.50

**La dormanto vekiga** H.G. Wells. El la angla tradukis A. Frank Milward. Londono: BEA, 1929. HB, 210p. £2.20

**The English–Esperanto Dictionary** Joseph Rhodes. Londono: 1908 . HB, 548p. £3.00

**Junaĝa verkaro** Edmond Privat. Antaŭparolo de Julio Baghy. La stilo de E. Privat, prozo kaj poezio. La Laguna: Stafeto, 1960. SB, 142p. £2.50

**La karnavalo kaj la somnabulino** Karl Lebrecht Immerman. El la germana tradukis A.E. Wohlthat. Novelo. Londono: BEA, 1952 . SB, 103p. £1.35

**Kiso de la reĝino** I.F. Najjvin. El la rusa tradukis D. Staritsky. Novelo. BEA, Anglujo, 1950. SB, 188p. £1.35

**Kolektitaj poemoj kun biografio** L.N.M. Newell. Redaktis Edwin de Kock kun antaŭparolo. Dudek naŭ poemoj verkita inter 1926 kaj '65. Manchester: Esperantaj Kajeroj, 1987. SB, 77p. £1.50

**Kredu min sinjorino** Cezaro Rossetti. Gajegaj originalaj rakontoj de komerca vendisto. Londono: SAT, 1974 (2a eld.). SB, 260p. £3.00

**Kvin virinoj de amoro** Ihara Saikaku. El la japana tradukis Miyamoto Masao. Oosaka, 1966. HB, 160p. £2.50

**Lingvistikaj aspektoj de Esperanto** J.C. Wells. Elstara scienca priskribo pri Esperanto kiel lingvistika fenomeno, facile legebla. Roterdamo: CED, 1978. SB, 76p. £1.80

**Mi amis junulinon** Walter Trobisch. El la franca tradukis Adolf Burhardt. Konfidenca korespondado inter franco kaj afrikano. Baden Baden: 1966. SB, 140p. £1.80

**Naskiĝo de la rustimuna ŝtalrato** Harry Harrison. El la angla tradukis Edmund Grimley Evans. Sciencfikcio. Jekaterinaburg 1996, HB 222p. £2.80

**Ni devus vivi** Kjell Walraamoen kaj Lina Gabrielli . Prok. 50 originalaj poemoj senrimaj en malferma, interparola stilo. La Laguna: Stafeto, 1974. SB, 154p. £1.60

**Nigra magio** Dek Dorval kaj Christian Declerck. Originala krimromano. Antverpeno: FEL, 1988. SB, 215p. £2.50

**Nuda inter lupoj** Bruno Apitz. El la germana tradukis Karl Schulze. Leipzig, 1974. HB, 480p. £3.00

**Ora duopo – Jubilea libro pri Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay** Elektita poemaro eldonita por la 75a naskiĝjaro de la du eminentaj verkistoj. Antaŭparoloj de W. Auld, S. Szathmári kaj L. Tárkony. Redaktis L. Kökény. Budapeŝto: Hungara Eo-Asocio, 1966. HB, 183p. £1.50

**Originala verkaro** L.L. Zamenhof. Antaŭparolo, gazetartikoloj, traktaĵoj, leteroj, poemoj. Leipzig: F. Hirt & Sohn, 1929. HB, 604p. £5.50

**Plena ilustrita vortaro de Esperanto** ĉefred. G. Waringhien. Parizo: SAT, 1970 (1a eld.). HB, 1,298p. £7.00

**La Sankta Biblio** Malnova Testamento tradukita de L.L. Zamenhof, Nova Testamento de aliaj. British & Foreign Bible Society, 1960. HB, 996p. £5.00

**Sep fratoj** Aleksis Kivi. El la finna tradukis Ilmari Elström. Klasika romano de la finna literaturo el 1870. Helsinko: Vilho Setälä, 1947. HB, 360p. £1.50

**33 rakontoj – La Esperanta novelarto** Redaktis Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágyi. 29 aŭtoroj el 11 landoj. La Laguna: Stafeto, 1964. HB, 328p. £3.00

**La vojo returne** Erich Maria Remarque. El la germana tradukis Joseph F Berger. Sekvaĵo de *En okcidento nenio nova* (*All Quiet on the Western Front*) Kolonjo: Heroldo, 1931. HB, 370p. £3.00

# ***New books and discs / Novaj libroj kaj diskoj***

• Please add 15% for postage and packing – minimum postage cost £1.50. Please make cheques payable to 'EAB' or phone Esperanto House on 0845 230 1887 to make a purchase by debit (or credit) card. Go to <http://www.esperanto-gb.org/eab/bookcat.htm> for the full list of goods. EAB's stock is limited by space, but we could order a special title for you from UEA and let you pay EAB in sterling.

## **NEW – NOVAĴOJ**

### ***Gerda malperis – la filmo*** (DVD)

Claude Piron £18.00

Brazil: Imagu Filmoj, 2007. The film of Claude Piron's mystery story for beginners, which gradually introduces new vocabulary with every scene. Subtitles in Esperanto, English, other languages. 72 min., NTSC (525 lines/60 Hz, which might not play on some older European TVs/DVD-players (if you cannot play the DVD please return it in good condition within 21 days for a full refund).

### ***Kanto Ĝenerala***

Pablo Neruda £3.50

Paris: SAT, 2010. 22p., 20cm. A booklet of nine poems, set to music by Mikis Theodorakis. Translated from the Spanish by Georges Lagrange, Michel Duc Goninaz and Bernard Behra.

### ***Kompendio de La Kapitalo de Karlo Markso***

Carlo Cafiero £9.40

Paris: SAT, 2009. 155p., 18 cm. A summary of Karl Marx's fundamental work on capitalism, in non-specialist language. Translated from the French by P. Levi.

### ***Plano B – Mobilizo por savi civilizacion***

Lester R. Brown £13.00

Paris: SAT, 2009. 344p., 24cm. A reference-work on the current state of the world, from environmental, social and political viewpoints, with the author's own proposals for addressing its associated problems. Translated from the English by Robin Beto and others.



### ***Traktaĵo pri ateologio***

Michel Onfray £13.00

Paris: SAT, 2010.

185p., 24cm.

An essay on Judaism, Christianity and Islam. Translated from the French by Paul Signoret.


### ***Tuikero la harkio kaj la cetero***

Roger Condon £11.00

Paris: SAT, 2010.

150p., 20cm.

A personal account of a soldier, during 1961–62 fighting, in the Algerian war of that period.



# A packed few months

www.jeb.org.uk

Early summer is always a quiet time for JEB meet-ups, with other commitments and events often taking over.

## Esperanto stand in Roskilde

As such, our summer meet-up is generally the least attended of the year – this year's wasn't helped by a scheduling clash with the Roskilde Music Festival, which was attended by several *JEBanoj* who volunteered to run the Esperanto stand, including newcomer Alex Jarvis.

## Enjoyable weekend in York

For those of us who were able to make it, however, it was an enjoyable and interesting weekend in York; on the Saturday we joined the Yorkshire Federation's seminar, hosted by John Wells, on the topic of "Kiel ekspluati la vortprovizion de Esperanto", followed by more touristy activities on the Sunday, including a walking tour of the historic city walls.

## Terure *mal*Organizita!

Paul and Neil Roberts travelled to Toulouse to participate in



*Neil Roberts kaj Gijom (la franco, kiu koncertis dum la Brita Kongreso en Llandudno) en Albi, suda Francio, dum la internacia renkontiĝo FESTO*

their first international event, FESTO – short for Franca Esperanto-Semajno Terure Organizita, possibly the most honest and appropriate name ever, as an admin error meant that the initial accommodation (at Paul Sabatier University) was no longer available.

The result was that the organisers had to scramble to acquire tents in a field in Donneville, some 20km from Toulouse. This was particularly unfortunate for

Tim and Clare, who were already holidaying in Toulouse, and so were belaboured with luggage, and opted to spend another week in their hotel. After a three-hour journey from Toulouse (including 90 minutes on foot) the JEB veterans reached the FESTOejo, only to have to leave with everyone else within an hour for an excursion... to Toulouse, whence they had just arrived!

## Much planned

In contrast, much is planned for the next few months, including a camping weekend in East Sussex, during which we intend to organise a JEB version of the popular Drondo, in three sessions. The aim is to present to those people who have had limited exposure to spoken Esperanto an opportunity to practise in the company of their friends, rather than undergoing the baptism of fire which could be a fully fledged Drondo amongst strangers.



*Jake Pentland kaj Marteno Minich en Edinburgo, dum la lastatempa JEB-renkontiĝo en tiu ĉefurbo*



Additionally, there will be excursions to Brighton, campfire songs, and a visit to one of the local sights, either the Pavilion, the games museum, or the SeaLife museum, depending on the tastes of the participants.

During their recent holiday in France, Tim and Clare were approached by French Esperantists who wanted some details, so there may be a reasonable foreign contingent present.

August will see a return to London, the site of last year's autumn meet-up, which set a then record of 14 participants. Shortly thereafter there will be a visit to one or more theme parks in October. A small group are also planning an independent trip to the Netherlands, and a JEB contingent will be present at a non-Esperanto event, attending the Edinburgh Fringe Festival for a weekend in late August.

### Busy online

A quiet few months in the 'real world' doesn't mean that we've not been busy online.

There has been plenty of activity on our Forum (<http://jeb.org.uk/forumoj>), thanks in part to a number of new members. We've also set up a chatroom, which has proved a popular way for the members to communicate – and, as the vast majority of the chat has been in Esperanto, a great way for the new members to practise the language.

Details of how to access the chatroom can be found on our website – there's usually someone around, and we tend to log in *en masse* on Wednesday evenings, in the aim of providing somewhere where newcomers can consistently expect to find someone to talk to.

### JEB also busy in the media

It's also been a busy few months for JEB in the media, with several *JEBanoj* having been interviewed

## EAB Update *now online*

A growing trend amongst member associations is the move from the physical world to electronic alternatives, especially as regards sending things through the post.

Charities and businesses seem to send more and more things into our e-mail in-boxes rather than belabouring our poor postmen. Certainly those associations which have adopted electronic newsletters in place of their previously printed versions must be extremely happy to be saving so much money.

### Saving money

It is with a view to minimising printing and postage costs and cutting down on waste paper that will be thrown away after reading that EAB has decided to provide an online version of *EAB Update*. The printed version will remain and will continue to be posted out to members, as always.

Some members have already indicated a preference to use only the online version, saving the Association the costs of printing and posting. If you too would like to access the online version of *EAB Update* and forego the printed copy, please send a message from your current e-mail address to Viv O'Dunne at Esperanto House ([eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org)). Viv will then e-mail a password to those people on her list in time with the release of every issue of the bulletin, which will allow them to access that particular issue.

If you have any queries, feel free to contact Clare Hunter via [clareh662003@yahoo.de](mailto:clareh662003@yahoo.de).

Clare Hunter

by various radio stations and newspapers, including a surprisingly positive article published on the website of *The Sun*, who interviewed Robin Hawkins, Alex Jarvis, and JEB alumna Heather Eason. Links to the article (replete, of course, with references to "boffin" Zamenhof and "wacky" language) along with

links to several recent audio interviews and, as always, more information about JEB, can be found at our website (*above*), where we're happy to see people young and old. (One of our most prolific posters in the forums, and a fine addition, was a member of JEB in the early 1960s!)

Thomas Preece

---

## MALLONGE

*Daŭrigo de sur paĝo 13*  
Istanbulo ekde la 6a ĝis la 8a de majo 2011. Temas pri interlerneja renkontiĝo por lernejoj kun klasoj lernantaj Esperanton. Plenkreskuloj gastigos pli aĝajn partoprenantojn, sed eblas ankaŭ hotela loĝado. Samtempe okazos la 2a Turka Junulara Kunveno, kaj oni esperas tie fondi Turkan Asocion de Esperanto. Por ĉia informo: Muraz Ozdizdar ĉe [mozdizdar@uaa.k12.tr](mailto:mozdizdar@uaa.k12.tr).

• **Artikolo en *Times of India***  
Se vi iros al <http://timesofindia.indiatimes.com/Home/Opinion/Edit-Page/The-global-language/articleshow/6163671.cms>, vi trovos artikolon pri Esperanto.

---

## IN SHORT

*Times of India* estas inter la plej vaste legataj anglalingvaj ĵurnaloj en Barato. La artikolo, de Probal Dasgupta, reliefigas la kontribuon de Barato al la Esperanta movado tra la jardekoj. Ĝi ankaŭ mencias la EU-projekton, kiu ĵus financis la Esperanto-pontan tradukadon de infanliteraturo inter Barato kaj Italio, Slovenio kaj Kroatio. En la artikolo aperas emfazo pri la literatura ĉiuregiona reprezenteco de Esperanto, en kiu oni vere tutmonde konversacias kaj strebas al justa egalentento al ĉiuj regionoj.

La artikolo rezultis el tio, ke oni skribis al satira ĵurnalisto, kiu antaŭ kelkaj jaroj humure atakis Esperanton. Tiu ĵurnalisto diris:

“Vi estas la unua esperantisto, kiun mi ekkonas. Ĉu vi ŝatus verki 650 vortojn por la opinia paĝo?”

• **Nova estraro de UEA ŝutebla**

La programero ‘La nova Estraro sin prezentas’ dum la Havana UK estas spektebla en la Reta Kinejo de UEA. Ĉe [www.ipernity.com/doc/97850/home/video/vi\\_povas\\_elekti\\_unuopan\\_filmon](http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video/vi_povas_elekti_unuopan_filmon).

• **EU proponas forigi la italan kaj hispanan lingvojn**

Komisaro Barnier proponas forigi la italan kaj hispanan el la lingvoj de la nova patentosistemo de EU. Barnier trudas trilingvismon, uzante la motivojn de pragmatismo kaj tradukadaj kostoj.

• **World Congress online**

The World Congress in Havana was available to those not able to attend by going to the Radio Havana website. See also [www.ameriko.org/eo/rhc](http://www.ameriko.org/eo/rhc). This may still be available.

• **Testu restoracion esperanto!**

En la kvartalo Wankdorf de la svisa ĉefurbeto Berno, ekzistas restoracieto kun la nomo ‘esperanto’. Ĝin funkciigas gastejestro s-ro Murat, kiu estas kurdo el Turkio.

La gasteja nomo, la helverdaj seĝoj kaj menukartoj verdkoloraj kun – ekde aŭtuno 2010 – klarigaj tekstetoj nialingvaj krom la tute germanlingva priskribo de la ofertoj, montras la malfermitecon de s-ro Murat kaj lian jaman komprenon pri simboloj niamovadaj. Li ankoraŭ ne scipovas Esperanton, sed dum kunveno de Esperanto-Societo de Berno ĉe li en junio, oni donacis al li diversajn librojn. Oni petas esperantistojn iri por lin ‘testi’, se vi foje troviĝos en Berno! (Informis Ueli Haenni.)

• **Plia oficiala universitata kurso**  
Laŭ informo de Germain Pirlot, kiu kompiladas liston de oficialaj

Esperanto-kursoj en supera instruado tra la tuta mondo, aldoniĝis nun plia, en la Jagelona Universitato de Krakovo, la plej malnova de Pollando kaj unu el la plej prestiĝaj de Eŭropo. Instruas Maria Majerczak.

• **Monda Socia Forumo ekakceptas Esperanton**

Ni jam aperigis kelkfoje informojn pri la Monda Socia Forumo. En majo 2010, Mallely Martínez Mateos, prezidantino de Meksika Esperanto-Federacio (MEF), kaj Daniel Moreno, sekretario de MEF, kontaktis anojn de la Internacia Konsilio de la Monda Socia Forumo por informi pri avantaĝoj de Esperanto kaj oferti la necesan helpon rilate la proponon, faritan de J. Luis Gutiérrez Lozano, meksika samideano kaj ano de la konsilio, pri uzo de la internacia lingvo kiel laborlingvo inter membroj.

Okazis la unuaj paŝoj. Oni petis traduki tekston en Esperanton pri la Monda Socia Forumo okazonta en Dakaro. Sur la unua retpaĝo de MSF aperas informo en diversaj lingvoj, pri tio ke bulteno aperas ankaŭ en Esperanto: [www.forumsocialmundial.org.br/noticias\\_01.php?cd\\_news=2808&cd\\_language=1](http://www.forumsocialmundial.org.br/noticias_01.php?cd_news=2808&cd_language=1).

Dakaro, la ĉefurbo de Senegal, gastigos la centrigitan version de la forumo (6–11 feb. 2011). Oni serĉas homojn por tie reprezenti Esperanton.

• **Nova bildrakonto – senpage**  
Post la sukcesoj de ‘Rat-Man’ kaj ‘Diabolik’, la projekto RoMEo daŭrigas la prezentadon de italaj bildrakontoj al esperantistoj.

Antaŭnelonge aperis du rakontoj, kiuj povas vekti interesigon. La unua estas *Lupo Alberto*, kun la bildstrio de la helblua lupo el la plej fama bestobieno en Italio, kaj la dua estas *Lasta lekcio en Gotingeno*, rakonto pri la matematikaj nefinioj.

La ĉi-lastaj komikso estas senpage elŝutebla en formato PDF

(ĉe [www.pecorelettriche.it/esperanto/romeo/gotingeno.asp](http://www.pecorelettriche.it/esperanto/romeo/gotingeno.asp)), dank’ al afableco de ĝia aŭtoro Davide Osenda. La dosiero prezentas la unuan parton. Historio, matematiko kaj filozofio miksiĝas en vojaĝo al la nefinio.

Projekto RoMEo ŝatus eldoni presitan version, sed ĉar temas pri tutkolora speciala libreto, ĝi versajne kostus pli multe ol la normalaj komikslibretoj de la projekto RoMEo. Pro tio, oni bezonus trovi sufiĉe da eblaj aĉetontoj. Se vi ŝatis tiun ĉi rakonton, kaj dezirus subteni per aĉeto de papera ekzemplero, bonvolu tion anonci ĉe la projektestro Daniele Binaghi: [daniele.binaghi@libero.it](mailto:daniele.binaghi@libero.it).

• **Zamenhof elektita kiel humanisma heroo**

Tri artikoloj aperas sur la brita retejo de *Humanist Life* sub la titolo “Humanist Heroes: Ludovic Lazarus Zamenhof” ([www.humanistlife.org.uk/2010/06/humanist-heroes-ludovic-lazarus-zamenhof](http://www.humanistlife.org.uk/2010/06/humanist-heroes-ludovic-lazarus-zamenhof)), kun anonco jam sur la ĉefpaĝo. Ili estas subskribitaj de David Curtis, Ian Fantom kaj Paul Gubbins.

• **Milton Keynes news item**

A useful little article on Esperanto as “the language of love” appeared in the newspaper *MK News* of Milton Keynes on 28 July, featuring Anica and Terry Page ([www.mk-news.co.uk](http://www.mk-news.co.uk)), together with a portrait of the happy couple. Worth consulting if you want to find out how old they are!

• **Vidita dum la UK en Kubo**

Inter la interesaj sloganoj sur T-ĉemizoj, viditaj dum la Havana Universala Kongreso estis la vortoj:

*La latina estis*

*La angla estas*

*Esperanto estos*

Ĉu ankoraŭ pli bone en la koncernaj lingvoj? □

## ***Altnivela lingva seminario – kaj radia informado en Jorkŝiro***

Je sabato, la 26a de junio, John Wells instruis “Kiel ekspluati la vortprovizon de Esperanto” dum la ‘preskaŭ tradicia’ Somera Seminario en York (fotoj dekstre kaj sube).

John kaptis la okazon prezenti Esperanton ankaŭ en Radio York – matene de la 28a ([www.bbc.co.uk/programmes/p008f8lz](http://www.bbc.co.uk/programmes/p008f8lz)) dum “The Adam Tomlinson Show”, proksimume 110 minutojn tra la disaŭdigo. □



## ***South London Esperanto Group at the British Museum***

As part of its silver jubilee celebrations, the South London Esperanto Group hosted a visit to the British Museum, where Raymond Butler gave a guided tour – in Esperanto – of selected artefacts illustrating the development of writing in ancient Egypt, along with comprehensive notes and handouts, prepared by Raymond himself.

The tour started in the Egyptian galleries with ancient hieroglyphs on clay impressions, carvings and a coffin, followed by exhibits of Hieratic, Demotic

and Coptic writings. It ended with a visit to the Rosetta stone, and an explanation of how the three parallel texts had allowed the meaning of the ancient hieroglyph text to be (re)discovered.

Esperanto’s purpose of providing international communication means that many Esperantists have a natural interest in language development; this tour captivated the participants and gave them a fascinating insight into the development of writing.

Raymond Butler studied Egyptology and British archaeology, qualifying in archaeology at the University of London in 1984. Professionally he is a

computer programmer and, in Esperanto terms, classes himself as an ‘improver’; on the day he spoke fluently and with confidence, communicating specialised and technical matters with clarity and confidence.

Gregory Porilo

### ***Venontaĵo en Suda Londono***

La venonta ‘Kristnaska/Zamenhofa/Arĝenta-Jubilea Festo’ de la Sud-Londona Grupo okazos sabaton, la 11an de decembro ekde la 14a ĝis la 18a horo ĉe Unity Centre of South London, 2–4 Ravenstone Street, Balham, SW12 9SS. Ĉiuj estos bonvenaj! Alportu viajn geamikojn!

### **New Members of EAB**


Donald Fouracre,  
Downham Market  
W.F. Howliston, Brighton  
Wilfred Hughes, Woking  
Geraldine Roberts, Northants  
G.A. Schneider, Whitley Bay  
Martin White, Leeds

### **Deceased Member**

John Roberts, Littlehampton

### **Completed the Free Postal Course**

Elizabeth Beskine, Letchworth



Ĝisdatiĝu per

John C. Wells

## *English–Esperanto–English Dictionary (Angla–Esperanto–Angla Vortaro)*

Ampleksa sed konciza ambaŭdirekta vortaro por komencantaj kaj progresintaj studentoj de Esperanto, kun enkonduka prezento de la gramatiko de Esperanto


Unue publikigita en 1969 de la eldonejo Hodder kiel *Teach Yourself Concise Esperanto and English Dictionary*, la nuna, dua eldono estas zorge reviziita kaj komplete reverkita. Ĝi plene spegulas la hodiaŭajn anglan lingvon kaj Esperanton.

Kun entute pli ol 30 000 kapvortoj, ĝi estas nemalhavebla riĉfonto por uzantoj de Esperanto, tenanta ĉiujn vortojn, kiujn oni bezonas, inkluzive de multaj fakvortoj.

Eldonas: Mondial (Novjorko), 2010 (Broŝurita versio:

ISBN 978-1-59569-149-1; Malmole bindita versio kun kromkovrilo: ISBN 9781595691507). Ambaŭ: 508 paĝoj (xlvii + 462). Grando 5.5 x 8.5" (14 x 21,6 cm). Por pli da informoj vizitu la retpaĝaron: [www.librejo.com/wells-vortaro](http://www.librejo.com/wells-vortaro).

- *Vendoprezoj ĉe EAB*: £15 (broŝurita) kaj £29 (bindita), plus sendokostoj je 15%. Reta butikoj: [www.fastcart.co.uk/cart/index.php?id=9449&item=Wells+Dictionary](http://www.fastcart.co.uk/cart/index.php?id=9449&item=Wells+Dictionary) – aŭ telefonu al 0845 230 1887.



*Lingvo kaj menso* de Noam Chomsky estas kolekto de revoluciaj eseoj el 1967 pri lingvosciencaj kontribuoj al studado de la menso, formo kaj signifo en naturaj lingvoj, naturo de la lingvo, lingvoscienco kaj filozofio, biolingvistiko.

La serio Scienca Pensado strebas, sub la aŭspiciado de UEA, evoluigi la ĉeeston de tiu branĉo de la sciaro en la Esperanta librokulturo. Ĝi stimulas la lingvokultivan tradukadon de gravaj natur- kaj soci-sciencaj verkoj, jen mejloŝtonaj el historia vidpunkto, jen elstaraj kiel altnivela sciencopopulariga literaturo, jen kontribuaj al la kompreno pri la scienco kiel plurala dimensio de la kulture same plurala homa civilizo.

Kiel dua volumo de la serio, jen unu el la plej gravaj verkoj de la moderna lingvoscienco.

Bonŝance, ni povas profiti je la lingva lerteco de la tradukinto kaj je la gvida aliro al la verko de elstaraj fakuloj. Interese, en siaj respektivaj antaŭparolo kaj enkonduko, ili sukcesis tuŝi gravajn aspektojn de la lingveco kaj signifo de Esperanto laŭ iuj elementoj de la intelekta tradicio lanĉita de Noam Chomsky.

*Lingvo kaj menso* de Noam Chomsky. Tradukis Edmund

Grimley Evans. Antaŭparoloj de Probal Dasgupta kaj Hiroshi Nagata.

Rotterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2010. 188p., 21 cm. ISBN 978-92-9017-114-0.

**Mendu de EAB** kontraŭ £8,20. Bonvolu aldoni 15%ojn por sendokostoj – minimuma poŝtkosto estas £1,50. Bonvolu skribi ĉekojn al 'EAB' aŭ telefonu al la Esperanto-Domo per 0845 230 1887 por aĉeti per debeta (aŭ kredita) karto.